Lavistino fonta

Lavistino fonta,
najado fakta kaj reala.

Zefiroj nunaj
vian karnon traktas
disdegne kaj profane.

Via pimpo kruda kaj spontana
ne cedas al rabioj
de aŭroroj misaprecaj.

Koluzias fridoj, frostoj,
viaj manoj hirtas, dronas
en tumulto de bobeloj.
La sinuo viabrusta,
dura kaj aŭtenta,
la sino blanka kaj novala
konkeras tutan frison
el koketoj kaj preciozoj,
superas la dekoltojn
de postiĉoj gelatenaj.

Gonçalo Neves

Lavistino fonta,
majesta ĉe gargaroj:
vian revon vringu,
sternu sur la ŝtonoj,
kaj la suno venu kaj regalu,
kaj komplezu kaj provizu,
kaj alvoku la latentojn
el soporoj kaj somnoloj
de elfoj kaj niksinoj.

En epoko de galopo,
hasto, strečo kaj nervozo,
via tasko gurde frota
garantias la daŭrivon
de legendoj kondamnitaj.